

Esperanto en la instruplanoj lernejaj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-814/274, k40, 1979 majo 17, 19

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Unu el la diskuttemoj de grava kolokvo pri la instruado de esperanto en la lernejoj okazinta en Berno la 31-an de marto estis tezoj pri la enhavo de instruplanaj projektoj. Ni troviĝas antaŭ dokumentoj, kies enhavo prezentas ion tute novan en la pedagogia literaturo. Ĝis nun oni ripetadis, ke esperanton oni devus instrui en la lernejoj, sed neniam precizan instruplanon oni prezentis al ĝenerala diskuto. Tial ni opinias vin interesi, eĉ se vi ne estas pedagogoj, raportante pri la enhavo de la instruplanoj prezentitaj al la kolokvanoj en Berno. La originalaj dokumentoj estas verkitaj en la franca kaj titolas "programme d'enseignement de l'espéranto à l'école secondaire" kaj "enseignement de l'espéranto comme 2ème langue étrangère au degré gymnasial". Esperantigo: Instruplano de esperanto por la duagrada lernejo kaj instruado de esperanto kiel dua fremda lingvo en la gimnazia grado.

A.- Enkonduke tiuj raportoj ekzamenas la diversajn eblecojn enkonduki esperanton en la lernejojn.

Cl.- Tiu ĉi instruado povus jam okazi en la baza lernejo antaŭ la instruado de la unua fremda lingvo. Tiun ĉi formulon proponis Pierre Bovet kaj post li la kampanjoj celantaj la enkondukon de esperanto en la lernejojn, pro la pozitivaj rezultatoj de pedagogiaj eksperimentoj, kiuj ŝajnas pruvi, ke la lernado de esperanto faciligas tiun de la fremdaj lingvoj.

A.- Tiu ĉi solvo enhavas ĉefan malavantaĝon: ĝi igas necesa la kunordigon de la instruado de la fremdaj lingvoj kun tiu de esperanto. Tiu situacio trudus lerneajn strukturŝanĝojn. Tial ĝi estas simple nerealigebla nuntempe kaj pro tio ĝi devas esti forlasita. Tamen tiu rezigno ne signifas, ke ĉia eksperimento en la baza lernejo pri la esperanto-instruado devus necese ĉesi.

Cl.- La plej taŭga momento por la enkonduko de esperanto en la lernejojn ŝajnas esti tiu de la elekto de la dua fremda lingvo. En la mondo la plimulto de la instruplanoj antaŭvidas la instruadon de du fremdaj lingvoj, la unua estas la sama por ĉiuj en la koncerna regiono kaj la dua povas esti elektita inter limigita nombro da lingvoj. Koncerne esperanton la nuna tendenco ĝuste estas al ĝia listigo inter la elekteblaj lingvoj.

A.- Svislande la elekto de la dua fremda lingvo okazas ĝenerale en la duagrada instruado ĉe la 8-a jaro de la lerneja vivo. Ĝis la abiturientiĝo restas do du jaroj ĉe la duagrada lernejo kaj tri jaroj de gimnazia studado. La semajna horaro konsistas ĝenerale el du lekcioj.

Cl.- La elekteblaj lingvoj estas fakte tre malmultaj en Svislando. En la plimulto de la urboj de Romanda Svislando la elekto reduktiĝas al la studo ĉu de la angla, ĉu de la itala. La enkonduko de esperanto inter la kandidatojn alportus fakte nur etegan ŝanĝon laŭ vidpunkto financa kaj kvanta, sed kvalite pliriĉigus la programojn.

A.- Por ke esperanto eniru la instruplanojn, estas necese ke ĝi ricevu la statuson de lingvo valora por la abiturientiĝo kaj ke la interesata instruistaro povu sekvi konvenajn formad-

kursojn. Tiu ĉi formado povus tute konvene disvolviĝi en Svislando en la kadro de la aktiveco de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- En la lernejoj kie la instruado de fremdaj lingvoj montriĝas senfrukta kaj kie pro tio ĝi neglektiĝas,, ekzemple en kelkaj metilernejoj, la lernado de esperanto povus tamen esti proponita al la interesatoj. Estas eble ke ĝi kondukus al kuraĝigaj rezultatoj, se ĝi baziĝus sur instruplano, kiu akcentas la parolan praktikon de la lingvo.

A.- La instruplano ellaborita de Kultura Centro Esperantista konvenas aparte bone al la duagrada instruado. En du studjaroj laŭ semajna horaro kun du lecionoj kompletigitaj de 5 ĝis 10 minutoj de hejmtaskoj, ĝi permesus konduki ĉiujn gelernantojn al rego sufiĉa de la uzo parola kaj skriba de esperanto, por ke instrufako povu facile ekdisvolviĝi en tiu ĉi lingvo.

Cl.- Metodologie, por atingi tiun ĉi efikecon, la instruado devus disvolviĝi laŭ kvar vojoj apartaj kaj komplementaj:

A.- La gesta instruado celas la parolan praktikon de la lingvo.

Cl.- La aŭdvida instruado plifortigas kaj klarigas la malkovrojn de la gelernantoj kaj ligas la instruadon gestan al la instruado gramatika kaj stila.

A.- Ekzercoj kaj kurso programitaj permesas igi individua la gramatikan kaj stilan instruadon. Post la baza etapo ĉiu lernanto elektu la orientadon, kiu ŝajnas al li konvena: redaktadon kaj tradukadon, legadon, korespondadon, personan laboron kondukantan al la verkado de raporto, ktp.

Cl.- La kolektiva instruado utiligas la lingvon profite al la plivastigo de la kulturaj kaj civitanaj konoj de la gelernantoj. La analizo de literaturaj tekstoj konvenaj konduku al diskutoj pri temoj en rilato kun la priokupoj de la gelernantoj. Leciono kreskigu la sciojn pri la regionaj apartaĵoj kaj pri la internacia vivo. Interlerneja korespondado laŭ la tekniko de "Grajnoj en Vento", interŝanĝoj, preparo de renkontiĝo interkantona aŭ internacia kun sporta kaj kultura karaktero, ktp. estas efektivegeblaj dum la kolektiva instruado.

A.- Al ĉiu el tiuj kvar vojoj, gesta instruado, aŭdvida instruado, programitaj ekzercoj kaj kolektiva instruado estas rezervita la kvarono de la disponebla tempo.

Cl.- La pedagogoj, kiuj ekzamenis tiun ĉi instru-planon en la kadro de la kolokvo pri la instruado de esperanto en la lernejoj okazinta en Berno la 31-an de marto, tre favore akceptis ĝin, opiniantes, ke ĝi proponas tre taŭgan metodologion. Post la enkonduko, kiun ni traduke prezentis al vi, tiu ĉi plano iom detale priskribas, kio estas la gesta kaj aŭd-vida instruadoj. Ĉar ni jam havis la okazon paroli al vi pri tiuj ĉi instruteknikoj, ni detale parolos al vi la venontan semajnon ĉefe pri la programita instruado, pri la kolektiva instruado, pri la studplanoj kaj pri la helpaj metodologioj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis pri esperanto en la instruplanoj lernejaj gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!